# Informilo

19 FEB. 1982

ATENTU, BONVOLU

Ĉu vi ne forgesos ?

La ĝenerala jarkunsido 1982 okazos

sabaton 13-an de marto 1982 ekde 10.00 h. en

KASTEEL VAN HAM

STEENOKKERZEEL

Ĉiuj niaj gemembroj estas elkore invititaj. Ni atendos vin kiel eble plej multnombre. Sed ...
ĉar ni devas antaŭmendi la tagmanĝon, ni nepre sciu antaŭe kiomope ni tagmanĝos en la Kastelo.

Tial, bonvolu n e p r e anonci vian partoprenon antaŭ 06 03 1982 al la sekretario, Jan Bovendeerd, ĉu skribe ĉu telefone :

02/523 80 90 / 249 dumdejore
031/49 50 06 vespere ekde 19.00 h.

Koran anticipan dankon.

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN VLAAMSE ESPERANTO-BOND

JARKOLEKTO
JAARGANG 2 Nº 2 FEB 1982

VERANTW. UITGEVER
RESPONDECA ELDONANTO JAN BOVENDEERD, SPEELTUINLAAN 14, B-2510 MORTSEL

I N F O R M I L O

Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare

"INFORMILO" estas kontaktilo/ diskutilo inter la estraro kaj la membraro de FEL. Ĉiu povas partopreni en ĝi per personaj kontribuaĵoj. Tiuj ĉi kompreneble restu sub la respondeco de la kontribuantoj.

Tekstoj atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la monato.

================================

F E L - Ŝ P A R K O N T O

FIKSDATAJ MONDEPONOJ

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-5510531-55
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

================================

LIBRO-SERVO S O N O R I L O

Doornstraat 22

2610 WILRIJK

Direktoro : Monique VEREECKEN

Telefono : 031/27 24 05

Kontoj : 000-0152140-44

320-0342460-23

FLANDRA ESPERANTO-LIGO

Arsenaalstraat 5

2000 ANTWERPEN

Telefono : 031/16 05 05

Direktoro : Paul PEERAERTS

====================================

FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
031/66 62 66
prezidanto, estrarano pri informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estrarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

René BUDTS, Pr. Rooseveltlaan 168/9
9000 GENT
091/ 23 53 48
respondeculo por Orient Fland

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



Estimata Amiko,

x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x

x Ĉu vi notis la novan kont-numeron de FEL ? Jen ĝi denove : x

x 402-5510531-55 x

x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x x

La ideo pri ĝenerala jarkunsido en Kastelo de Ham ne estas nova. Ni jam faris tion pasintan jaron kaj neniu bedaŭris tion.

Fakte tio estas la speciala deziro de nia prezidanto, subtenata de la ceteraj estraranoj.

Ne nur estoso-krea ĉirkaŭaĵo, ne nur agrablo-riĉaj ejoj, ne nur trankviligaj kunvenejoj, amikecaj renkontiĝoj, serena kunsido, sed ankaŭ atentokapta evento.

La kastelo ja apartenas al la ministerio pri Nederlanda Kulturo, kiu disponigas ĝin senpage al rekonitaj kulturaj organizoj.

La fakto ke ni, por la dua fojo jam, ricevis permeson por okazigi nian ĝeneralan jarkunsidon en la kastelo, ja pruvas ke ni estas, ne nur rekonitaj, sed ankaŭ ke ni ne ne-rimarkite kunvenos.

Tion ni ne subtaksu. Se ni volas enpenetri la oficialajn instancojn, ni ne povas, ne rajtas preterlasi kian ajn okazon por pruvi nian ekziston, montri nian ĉeeston.

Tial do ni denove, kaj ankoraŭ denove insistas pri partopreno kiel eble plej multnombra, por pruvi vid'al vide la instancojn nian ĉeeston en la ĝenerala socia vivo, pruvi nian forton ..

.. kaj pruvi tion dependas nur de ni ĉiuj, ankaŭ de vi, Kara Leganto.

---

Ĉu vi notis en vian kalendaron ?

Sabato 6-a de marto 1982 estas grava tago por niaj grupestroj.

Ja okazos tiam speciala studotago, gvidota de S-ro G. MAERTENS, en ESPERANTO-DOMO, Frankrijklei 140, ANTWERPEN.

Temos pri A D I N I S T R A D O / F I N A N C A D O.

La kunveno komenciĝos je la 10.00 h. antaŭtagmeze ĝis ... ? ...

Estos tagmanĝ-ebleco en la Esperanto-domo.

Do, ne forgesu 06 03 1982.

# ĜENERALE

KADRO-KURSOJ

Je sabato 30-a de januaro 1982 kunvenis kursgvidintoj kaj -partoprenintoj por pridiskuti la pasintajn kadro-kursojn.

Plej interesaj ideoj interŝanĝiĝis kaj planoj fariĝis por la estonto.

La ĝenerala konkludo estas :
- la kursoj estas necesaj, interesaj, formigaj;
- ili devus esti partoprena_taj de multe pli da personoj;
- fakte la grupestroj, kiuj verŝajne ankoraŭ ne konsciiĝas pri la valo de la kursoj, devus montri pli da intereso kaj sendi al ili almenaŭ po unu persono el sia grupo;
- ni nepre daŭrigu la kurso-serion, eĉ pli-oftigu ilin,
- sed ni plifaciligu la partoprenon.

Jen, do.

La kursotekstoj estos haveblaj kajerforme, se estos sufiĉe da intereso.

Interesitoj tute simple anoncu sin.

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Vidu ankaŭ la januaran numeron.

L E U V E N - 21 02 1982

Jen finfine la programo :

Loko : Pavilono ARENBERG, Groenveldlaan, LEUVEN

13.00 h. Oficiala Akcepto
13.45 h. Enkonduko pri Internacia Amikeco kaj ties Semajno
14.00 h. Malfermo de la ekspozicioj far la Lovena Urbestraro
14.30 h. Filmo pri Loveno (Esperanto-lingva)
15.45 h. Esperanto-kvizo
16.45 h. Filmoj pri Brazilio kaj Meksikio, landoj de la pasintjaraj UK kaj IJK
18.00 h. Vespermanĝo
19.00 h. Diapozitivoj kaj filmo pri Pollando, kun enkonduka parolado
20.30 h. Amuza vespero.

Dum la tuta semajno, ĉiu-tage de 14.00 h. ĝis 19.00 h. (dimanĉe ĝ. 21.00h):
-ekspozicioj pri Esperanto, Hiroŝima-Nagasaki, Pollando
-libroservo,konkurso kaj tombolo



A N T V E R P E N O - 26 02 1982

Claude NOURMONT el Luksemburgo prelegos pri "Mia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo en 80 tagoj" + diapozitivoj + resumo en la Nederlanda.

K A L M T H O U T - 28 02 1982

La programon vi trovos en la januara numero de INFORMILO.

Grava sciigo :

La urbestro de Loveno proklamis la semajnon de 21 - 28 02 1982

S E M A J N O  D E  I N T E R N A C I A  A M I K E C O

Al tio certe ne restis fremdaj niaj amikoj de ESPERANTO 2000.

Gratulojn !

---------------

# L E G A N T O J  S K R I B A S ...

HIROŜIMA-NAGASAKI

" Kun rilato al ... la ekspozicio Hiro_ŝima-Nagasaki, mi prezentas mian kunlaboron, se vi pretos demonstracii ajude, kiel la Japanoj turmentis dum kvar jaroj 1941-1945, en la tiama Nederland-Hindujo, senkulpajn edzinojn kaj infanojn.
Pri tio vi povas legi en la libro "SUR INSULO MALPROKSIMA" de S-ino Jo van Hemert-Remmers...

Hans Bakker.

Respondo de APE (iniciantintoj de la ekspozicio)

" ... La krimojn far Japanoj en Nederland-Hindujo, kiel ĉiu menssana homo, ni malaprobas. La legado de la libro "Sur Insulo malproksima" sendube prave atestas.
Sed ni ne permesas al ni imagi, ke pro tiuj krimoj, atoman neniigon meritis la japana loĝantaro de Hiroŝima kaj Nagasaki !
Tutcerte ni, kiel vi, ankaŭ ne pretendus, ke nur Japanoj kapablas krueli.
Konsekvence, se vi bonvolus konsideri, ke la atom-neniiga minaco ekzistas, Damokla glavo, por ĉiu surtera homo, neniu nacia aŭ rasa preteksto valoras por kontraŭstari aŭ eĉ kondiĉigi la necesajn informojn ĝin koncernantajn.. "

Clement Tholet
sekr. de APE

---------------------

# UEA-DELEGITOJ

La ĉefdelegito de UEA en nia lando volus scii ĉu en Flandrio estas novaj

kandidat-delegitoj.

Kiel vi povas delegit-iĝi ?

- vi estu almenaŭ 18-jar-aĝa (Junula Delegito : 16 - 30-jara)
- vi bonu kaj regule legu la revuon ESPERANTO kaj la Jarlibron
- vi estu preta plenumi la oficon dum minimume 3 jaroj.

Pliajn detalojn vi trovos en la Jarlibro 1982 paĝo 78. -

---

ATENTU ! Tiel Universala Kongreso, kiel Internacia Junulara Kongreso ŝanĝis siajn kotizojn.

Jen la novaj :

## Universala Kongreso. - Antverpeno

| Kongreskotizoj validaj ĝis la dato: | 82.03.31 | | 82.06.12 | | Post la 12a de junio 1982 aliĝoj ne plu estos akceptataj, kaj la aliĝontoj devos pagi surloke en la kongresejo, laŭ la koncerna tarifo de la tria periodo plus krompago 40 gld |
|---|---|---|---|---|---|
| | *gld.* | *bfr.* | *gld.* | *bfr.* | |
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA . . . . | 207 | 3290 | 226 | | |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro . . . . | 182 | 2890 | 201 | | |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo . | 144 | 2290 | 163 | | |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 . . . . . . . . | 145 | 2300 | 158 | | |
| 5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3 . . . . . . | 128 | 2030 | 141 | | |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara . . | 62 | 990 | 68 | | |
| 7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara . . . . . . . . . | 104 | 1650 | 113 | | |
| 8. Blindulo . . . . . . . . . | 83 | 1320 | 91 | | |

* **Aliĝantoj en Belgujo** povas pagi en bfr. al poŝtĉekkonto 000-0457808-65 je la nomo de 67-e Wereldcongres van Esperanto, Antwerpen. Samtempe sendu vian aliĝilon al 67-a UK de Esperanto, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

## Internacia Junulara Kongreso - Leuven.

| Aĝo de la Kongresano je pagdato | ĝis 15/01/82 | ĝis 30/04/82 | ĝis 30/06/82 | post 1/07/82 |
|---|---|---|---|---|
| -20j | --- | BF 3910 | aliĝante post la 2a | |
| 21j-25j | --- | BF 4420 | periodo, petu novan | |
| 26j-33j | --- | BF 5100 | aliĝilon ĉe la LKK. | |
| 34j- | --- | BF 5610 | La kotizoj altiĝos! | |

b. El **Belgio**: pagu al la bankkonto 734-3332670-50 de la 38a IJK 1982 - LEUVEN Menciu "38a IJK 1982" kaj vian nomon.

# PROTOKOLOJ

F E L - estrarkunsido de sabato 13 01 1982 en Antverpeno.

Ĉeestas : Edward SYMOENS, Roger DE SCHEPPER, Jules VERSTRAETEN, Paul PEERAERTS, Gerd JACQUES (FLEJA) kaj Jan BOVENDEERD.

Prezidas : E. Symoens, posttagmeze R. De Schepper.

Komenciĝo : 10.00 h.

T A G O R D O

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 09 01 1982 estas aprobita.

2. RAPORTADO

2.1. Financoj : JV, RDS kaj PP pritraktos tiun ĉi punkto sub 3.

2.2. Administrado (JB)

2.2.1. La komision, kiun JB ricevis rilate al kontrolado de la E°-centro, li (ankoraŭ) ne plenumis. Kiam li, je lundo 08 02 82 laboris dum duona tago en la Centro, li konstatis, ke ĉio funkciis glate kaj ke ĉiu estis daŭre okupata. Li komprenis ke "kontrolo" ne nur estas ne serioze farebla, sed ankaŭ tute ne necesa.
JB opinias, ke ni plene fidu la labormanieron de PP kaj lia stabo.

2.2.2. La prezidanto opinias, ke ne temas pri kontrolo, sed pri informiĝo. La estraro devas scii tion, kio okazas en la Centro.

2.2.3. RDS opinias, ke la tasko de la sekretario ne estas kontrola, sed eventuale konsila aŭ helpa en la organizado.

2.2.4. SONORILO/FLEJA - vidu la FLEJA-protokolon, punkton F.

2.3.1. Kadrokursoj (JB)
La unua serio finiĝis kaj jam okazis kunveno de la kurs-gvidintoj kaj -partoprenintoj. La konkludo estis tre pozitiva. La kursoj devos esti daŭrigataj.
JB proponas pli detale raporti pri tio en la jarraporto por la ĝenerala jarkunsido.

2.3.2. Koresponda Kurso

Ĝis nun petis informojn 4 personoj. Tamen, la kurso ankoraŭ ne estas lanĉita,aŭ eble nur jus,en la gazetaro.
Ni atendu.

2.4. Informado, Planado, Organizado (ES)
La informado okazas kadre de tiu rilate al la UK.

2.5. "Internationale Liga voor Dierenrechten" (Internacia Ligo por

Besto-rajtoj) volas uzi Esperanton por siaj internaciaj kontaktoj. Unua kunveno okazos je merkedo 17 02 1982.

2.6.1. ESPERANTO-CENTRO (PP)

La prezidanto timas, ke PP kiel direktoro faras tro da laboro, kiu povas esti farita de aliaj personoj. Tiel li ne povus bone plenumi sian gvidan kaj organizan taskon. Li do demandas al PP kiel la Centro envere funkcias.

2.6.2. Ekzemple, kiu respondas la envenantajn telefonalvokojn ?

PP - Matene Anne Tilmont, posttagmeze Gerd Jacques.

ES - Ĉu estas kontrolo de la elirantaj telefonadoj ?

PP - Jes de la internaciaj. Por la enlandaj kaj certe por la enurbaj, kontrolo estas malfacile realigebla.

ES - Ĉu eblus, ke kiel eble plej multe da telefonalvokoj estus respondítaj resp. pritraktataj de Gerd kaj Anne ?

PP - Verŝajne jes, iom post iom.

2.6.3. Tamen, la telefonantoj devus esti iom (re-)edukitaj. Nun oni telefonas je ĉiuj momentoj, ne nur vespere je maleblaj horoj, eĉ dum la semajnfinoj.

JB Proponas sin teni strikte je la laborhoroj kaj ne plu respondi telefonadojn ekster ili. Li opinias, ke ĉiu respektu la privatan vivon de ĉiu. Ne estas pro tio, ke PP kaj liaj helpantoj pli-laboras vespere aŭ dum-semajnfine - fakte por labori trankvile ! - ke aliaj devas profiti de tio. Cetere, kiu inter ni volus, ke oni ĝenu nin per niaj profesiaj okupadoj ekster la normalaj laborhoroj ? Telefoni do nur dum la normalaj dejorhoroj.

2.6.4. La prezidanto emfazas denove, ke li tute ne kritikas, sed simple volas infrom-iĝi.

2.6.5. Plia demando : ĉu ĉiu en la centro laboranto konas Esperanton ?

PP - Jes.

2.6.6. ES - El Gento (LA PROGRESO) venis plendo. Ili pagis siajn kotizojn en novembro, sed ankoraŭ ne ricevis sian parton.

PP - Fakte ne FEL ŝuldas al Gento, sed Gento al FEL !

2.6.6.1. Ĉu la nova kotiz-sistemo bone funkcias ?

PP - Jes por tiuj homoj kiuj korekte agas. Tamen, kiel ĉiam estas personoj, kiuj ne komprenas aŭ kiuj ne volas agi laŭ la instrukcioj.

2.6.6.2. RDS - Kio pri la abonoj. Kiam FEL pagos al SONORILO ?

PP- Normale unu fojon monate. Tamen, momente FEL havas malfacilaĵojn, ĉar certaj ŝuldantoj ne pagas siajn ŝuldojn.

RDS opinias, ke PP ne devas timi averti SONORILON pri tiaj malfacilaĵoj. La necesaj abonoj devas esti pagitaj por eviti ĉeso en la



alsendo de la revuoj kaj SONORILO tiam povus aranĝi tion atendante la pagon de FEL.

3. FINANCADO - BUĜETO 1982

3.1. Longega kaj ege detala pridiskuto ĉe la fino de kiu, ni devas konstati deficiton de pli malpli kvarona miliono da frankoj !

Alarmega situacio ! Plie, ni devas ne plu tro esperi ŝtatajn subvenciojn aŭ almenaŭ ne plu apogi nian agadon sur ili.

3.2. Kiel alfronti tion ?

3.2.1. Klopodi komercigi nian agadon, ekzemple pere de eldonadoj. Tio kostas monon por komenci, sed poste alportas enspezojn, kvankam risko de ne kompleta forvendo ĉiam restas.

3.2.1.1. Decidiĝas klopodi finprepari la verketon de R. de Roover : "AVENTUROJ DE ŜPAR- KAJ ALIA PORKO", samkiel nian broŝuron "ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO ?" ankoraŭ antaŭ la ĝenerala jarkunsido, por jam vendi kelkajn.

3.2.1.2. Por ebligi aŭ plifaciligi la eldonon, ni disponu pri komenckapitalo. Tamen, nia eldonkonto ne havis la esperatan sukceson. Nur tri personoj donis sekvon al la alvoko pagigi sian financ-organizon ĉiu monate po 100 F., malgraŭ la promeso de pluraj !

3.2.1.3. Ekzameni kun nia eldon/traduk-komisiono kiel ni povos plioftigi la eldonon de libroj.

3.2.3. Ŝpari el la elspezoj kaj kostoj, t.e. kiel eble plej malaltigi la la kostojn. Kiel ?

3.2.3.1. JB havas du proponojn. Ili verŝajne ne alportos multon, sed ni konsideru ĉiajn eblecojn.

3.2.3.1.1. Rilate al la telefono : por eviti oftajn telefonadojn, kunmeti aŭ noti ĉiujn pritraktotajn aferojn, kaj pritrakti ilin en unu sola telefonado unufojon semajne.

Tial JB telefonos ĉiun merkredon dum la posttagmezo al la Centro por pritrakti ĉiujn eventualajn aferojn.

3.2.3.1.2. Rilate al la afrankado : la sendotaĵoj por kutimaj aŭ regulaj korespondantoj, kunmeti kaj alsendi nur per maksimumaj pezoj (20, 50, 100, 500, 1.000, 2.000 gramoj) Evetuale sendi presaĵe ne tro urĝajn aferojn.

3.2.3.2.1. La propono de S-ro G. Maertens, eldoni nian jarraporton nacilingve kaj dissendi ĝin kiel eble plej larĝskale inter nia membraro kaj instancoj, devos esti prokrastita pro nura mon-manko. PP proponas disponigi nian kutiman jarraporton, kiu estas parto de nia subvencidosiero al ĉiu interesito.

3.2.3.2.2. Same, la propono de JB aldoni "UN kaj NI", kiu ĉi monate estas tre interesa, ne estas aprobita pro la sama kialo.

Ni jes povus propagandi ĝin.

3.2.3.2.3. INFORMILO povus esti duonigita por premi la kostojn.
Se ni konsiderus ĝin, kiel en la komenco, kiel kadro-gazeton, ni povus limigi nin al la nuraj necesaj informoj de la estraro kaj al la protokoloj de FEL kaj FLEJA.
Pri tio tamen decidu la ĝenerala kunsido.

3.2.3.3. Diskonigi kaj (klopodi) konviki al Ŝparado kadre de niaj "Fiks-dataj mondeponoj" eventuale per ESPERANTO PANORAMA.

3.2.3.4. Vendi kiel eble plej multe da kursoj.

3.2.3.5. Fari personan kampanjon por akiri kiel eble plej multe da membroj.

3.2.3.6. Klopodi trovi donacantojn.

3.2.3.7. Aliaj sugestoj estas ege bonvenaj.

4. DIVERSAĴOJ
Pro tempomanko, tiun ĉi punkton ne estas pritraktata.

Fino de la kunsido : 16.30 h.

JB

---------------



F L E J A - estrarkunsido de 20 01 1982 en Antverpeno.

Ĉeestas : Gerd JACQUES, Kiki TYTGAT, Jean Pierre VandenDaele

Komenciĝo : 14.00 h.

T A G O R D O

A. FLEJA (estrarkunveno de 31 10 1981)

1. Interna regularo (propono) pritraktiĝos dum marta kunveno. Bonvolu legi kaj aldoni jenon sub 3. Estraro, ero 3.2. Proceduro :

   Kandidatoj prezentas sin okaze diskreta elekto de la nova estraro. Tiu estraro estas elektita grupe. La protokolanto organizas la voĉdonadon. Ĉe voĉegaleco la protokolanto organizos duan sekretan elekton. Kiam li denove konstatas voĉegalecon, li organizas duan sekretan voĉdonadon pri la kandidatoj individue.

2. Jarkunveno :
   Ĝi okazos je dimanĉo 7-a de marto 1982. Invit-iloj sekvos kiel aldono de Koncize. Jen la pritraktotaj punktoj :
   - jarraporto kaj financoj : Kiki prezentis laborskemon pri la ĝenerala jarraporto de FLEJA.
   - voĉdonado pri la interna regularo
   - elektado de : a) nova estrao
     b) TEJO-komitatanoj. Kandidato estas ĉiu. Volontuloj unue kandidatiĝu.
   - revizoroj
   - agado dum 1982

3. T-ĉemizoj : 200 estos menditaj kun jenaj koloroj : blanka fono kun verda desegno. Ni vendos ilin por po BF 170,-.
   "Sweatshirts" : 100 estos menditaj kun jenaj koloroj : blua fono kun malhelblua desegno. Prezo : BF 500,-.

B. Lichtaart 1982
Gerd prizorgos raporton kaj finkalkulon pri Lichtaart 1981.
La temo sekvontjara povus pritrakti alternativan kuracadon.
Ĉar la renkontiĝo okazos por la kvina fojo, estus speciala aktiveco. Dum sekvonta estrarkunsido pritraktiĝos titolo, subvencia demando kaj unua informilo.

C. Koncize : La enhavo similas al tiu de JEN. Tamen FLEJA restas provizore ĉe Koncize. Por la sekvonta jaro ni decidos dum la jarkunveno (Agado) ĉu FLEJA restos ĉe Koncize.

D. Pasporta Servo : la adresoj por Belgio estos korektitaj.

E. ECB (Eŭropa Kunordiga Buroo) : Pri la neŭtraleco de ECB ne estas disputo. Tamen ni kontraŭstaras la ĉiujarajn aliĝkostojn (pagitajn de TEJO)

F. SONORILO : ĉu konkurenco inter la eldonejo Sonorilo kaj FLEJA ?

1. FLEJA rajtas vendi librojn al ĉiu ajn (same kiel FEL kaj TK Stafeto) sed provizore faris tion nur al siaj propraj membroj kaj dum siaj kongresoj por havigi al si enspezojn.
2. Ĝi ĉiam respektis Sonorilon kaj do neniam havis librostandon dum aliaj aranĝoj aŭ en aliaj grupoj, eĉ ne kun siaj eldonaĵoj kiel ekz. naskiĝkalendaroj, butonoj ktp.

PS. La kialo de malbona vendo far Sonorilo en Flandrio povas esti laŭ ni, ke :

- la homoj ne ŝatas iri al Wilrijk
- la homoj tro devas atendi la librojn
- ili preskaŭ neniam plu havas librostandon en la Verda Stelo.

G. IJK : interŝanĝo de Hungaroj.
Kiki skribos leteron al HEJA por esplori la interesiĝon pri la interŝanĝo de 5 Hungaroj. Kondiĉoj : ili parolu bone Esperanton, ne estu en la estraro de TEJO nek de HEJA kaj estu malpli ol 26-jaraj.
Eblus pagi aliajn junulojn el Orienteŭropo per ricevitaj donacoj. Homoj kiuj subtenas Orienteŭropanojn pagos la unuan mezan kotizon por IJK (interkonsenti kun LKK). Ĉe respondo pozitiva al sia letero, Kiki faros kontrakton por HEJA pri tiu interŝanĝo kun financa regularo.

H. Lingvoborso en Heizel je 13 03 1982.
FLEJA mem ne iros al tiu lingvoborso, ĉar estos samtempe FEL-jarkunsido. Kiki letere anoncos tion al Marc Demonty. Interesiĝantaj kunlaborantoj, kiuj volas mem iri al tiu borso, povos anonci sin al FLEJA.

Fino : 16.30 h.

Protokolis : Jean Pierre VandenDaele.

---



# KIO ESTIS..

## ANTVERPENO

### LA VERDA STELO

Januaro estis en Antverpeno evento-plena monato. Okazis ero da festaj aranĝoj en LA VERDA STELO.

Komencu ni tamen per la komenco.

Nov-jar tago. 01 01 1982
La klubanoj multnombre venis al la klubo por deziri inter si, buŝe kaj tuŝe, feliĉan nov-jaron.

09 01 1982
Internacia vespero pri poezio.

16 01 1982
"La jaro en bildoj", diris la programo. Tamen temis pri la lastaj dek jaroj. Paul Peeraerts estis kunmetinta serion da diapozitivoj pri kio okazis en LA VERDA STELO dum la lastaj dek jaroj.
Vere agrabla kaj ĝoiga vespero. Tamen ... kiom ni maljuniĝis !

22 01 1982
Solena jarkunsido.
Komence la ĉeestantoj aŭskultis la, jes ja, neeviteblajn raportojn de la sekretario, kasisto ktp. Ne mankis laŭda parolado pri ĉio, kio okazis en kaj ĉirkaŭ la klubejo depost la aĉeto de la Esperanto-domo. Nia domo !

Prezidanto Ivo - Jus reelektita (gratulojn, Ivo !) - speciale atentis tiujn personojn, kiuj laboris, certaj eĉ plentage!, kaj zorgis ke la klubejo finfine ricevu la aspekton pri kiu nun ĉiu ĝojas.

Ĉeestis eĉ UEA-prezidanto G. Maertens, kiu tre afable "kantis la laŭdon" de la Verdstelanoj. La grupo kiu, kiel li diris tre trafe, estas fakte la bazo de la Esperanto-movado en la lando.
Li pludaŭrigis kaj firmigis siajn gratulojn pere de bela donac-libro.

Ankaŭ FEL-estraro ĉeestis, kvankam la prezidanto estis malhelpata. Lianome parolis Paul Peeraerts, Direktoro de la Esperanto-Centro.
Ankaŭ flanke de FEL, LA VERDA STELO ricevis donacon (esperebele longdaŭran), nome pluv-ombrelujon por la kluba enirejo.
Prezidant-edzino Klara ricevis de la ĝenerala kasisto Jules Verstraeten la tradiciajn florojn kaj ... kisojn.

Nome de la LKK de la Universala Esperanto-Kongreso parolis Roger De Schep-

per, LKK-sekretario.

Li havis bonan novajon : ĝis fine de 1981 enskribiĝis jam pli ol 1000 kongresontoj. Plie, la Belga PTT eldonos ekde junio specialan poŝtmarkon pri "75-jara Esperantomovado en Antverpeno".

Sekvis FLEJA buŝe de Kristin TYTGAT.

Ŝi finis sian gratul-paroladon per la kanto : "Vivu la stel ... vivu la verda stel'."

Prezidanto Ivo tiam alvokis aron da jubileantoj kaj transdonis al ili donacon pro fidela membreco.

Inter ili, eble ne pro tiom-longa-membreco, tamen pro liaj specialaj meritoj, estis Jules Verstraeten la, por uzi la vortojn de Ivo, "ora drato" de la Antverpena kaj eĉ de la landa movado. Jules, la ĉiam ĉeestanta, ĉiam por ĉio preta, ĉion kungluanta LVS-prezidanto-vicprezidanto-sekretario-ĝenerala BEF-sekretario-kaj-poŝte-kasisto. Jules la persono al kiu ĉiu sin direktas por kio ajn kaj kiu ĉiam estas preta por helpi....

Jules, en emociplena respondprelego, "klarigis" kaj dankis.

Jen fine la listo de la jubileantoj :

| | |
|---|---|
| 55-jara membreco - | DE HONDT Jeanne |
| 35- " " | JACQUES-DEKETELAERE Henny |
| 30-j. " | MONTMIRAIL Jozef |
| | MONTMIRAIL Marie-Louise |
| 25-j. " | MONTMIRAIL Toon |
| 15-j. " | GOOSSENS Gustaaf |
| | DECLERCK Chris |
| | WUYTS Imelda |
| | DURWAEL Klara |
| | DE SCHEPPER Roger |
| | DE SCHEPPER-VEREECKEN Monique |
| | BASTIANEN Frans |
| | DE HONDT Koen |
| | CORNET Ronald |
| | DE HONDT Andrée |
| 10-j. " | DE GREEF Tanja |
| | BOLJAU Herman |
| | VAN MEIRVENNE Nestor |
| | BOVENDEERD Jan |
| | BOVENDEERD-BERNARD Marie-Louise |
| | BOVENDEERD Hilde |
| | BOVENDEERD Bert |



| | |
|---|---|
| 10-jara membreco - | PEEPERKORN A. |
| | LEUNTJES Cecile |
| | BLOCKMANS Peter |
| | BLOCKMANS Dirk |
| | DEHOUX Geert |
| | Blockmans Luc |

23 01 1982

Tut-taga turisma programo kun, je 11.30 h. akcepto en la urbodomo, kie skabeno Detiège tre afable bonvenigis la Verdstelanojn kaj laŭdis ilian agadon en la Skeldo-urbo, invitis al honorvino kaj gvidis la ĉeestantojn tra la belega, muze-aspekta urbodomo.

Vespere : agrabla kaj multnombre partoprenata bankedo sekvata de balo. La festado estis ege flandre-gaja kaj .. do .. ĝis-fru-matena !
Ĝi ankoraŭ longe restos en la memoro de la partoprenintoj.

29 01 1982

Kulmina punkto : pianorecitalo de Geert DEHOUX.

Mankas la ĝustajn vortojn por esprimi kiel mi volus nian admiron pro la malofte renkontata virtuozeco de Geert. Estis grandioza !

En la programo estis Sonato N° 5 en G major, KV 283 de W. A. Mozart, Sonato N° 17 en D minor, opus 31 N° 2 de L. von Beethoven, Fantazio N° 3 en B-bemolo min. de Peter Benoit, Balado N° 1 en G min., opus 23 de F. Chopin, Mazeppa de F. Liszt, prilaborita de Geert Dehoux kaj Rudepoema de Heitor Villa-Lobos.

Neforgesebla vespero !

-----------

HINGENE

Je merkredo 27 01 1982 okazis en Hingene informvespero en kiu partoprenis diversaj interesitoj. La kunvenon iniciatis la loka aktivulo, Geert Dehoux (jes la sama kiu tiel virtuoze regalis nin en Antverpeno).

---------

## ...ESTOS.

MORTSEL

Sabaton 6-an de marto okazos "agrabla kunesto" = kursfina festeto por enkuraĝigi la tiam ĵus finontoj de la unua kurso-serio kaj por altiri

novajn lernantojn por la dua serio,kiu komenciĝos diamanĉon 7-ande marto ekde 10.00 h. matene.

----------------

## E L E K S T E R L A N D O

En Nyköping, Svedio, la komunuma lerneja estraro decidis, ke Esperanto estos elektebla stud-objekto ekde aŭtuno 1982. Esperanto estos kvalifikita same kiel la Franca kaj la Germana lingvoj.

----------

INFRO-SERVO
Bismarckstr. 28
D-3550 MARBURG

alvokas al partopreno en la "Tutmonda Adresaro".
Interesitoj povas sendi al la supremenciita adreso siajn nomon, adreson, gradon de Esperanto-kono (elementa-meza-(tre)bona), eventualan korespondintencon ks.
La publikigo en la adresaro estas senpaga.

------------

A T E N T U TELEFONONTAJ AL LA ANTVERPENAJ REGIONOJ !

EKDE 13 08 1982 LA ANTVERPENAJ TELEFONNUMEROJ ŜANĜIĜOS JENE :

| | iĝos | | iĝos | | iĝos |
|---|---|---|---|---|---|
| 11 .. | 311 .... | 36 .. | 236 .... | 66 .. | 666 .. . |
| 12 .... | 312 .... | 37 .... | 237 .... | 67 .... | 667 .... |
| 13 .... | 313 .... | 38 .... | 238 .... | 68 .... | 568 .... |
| 14 .... | 314 .... | 39 .... | 239 .... | 69 .... | 669 .... |
| 15 .... | 315 .... | 40 .... | 440 .... | 70 .... | 770 .... |
| 16 .... | 216 .... | 41 .... | 541 .... | 71 .... | 771 .... |
| 17 .... | 217 .... | 42 .... | 542 .... | 72 .... | 772 .... |
| 18 .... | 218 .... | 43 .... | 543 .... | 73 .... | 773 .... |
| 19 .... | 219 .... | 45 .... | 645 .... | 74 .... | 774 .... |
| 21 .... | 321 .... | 46 .... | 646 .... | 75 .... | 775 .... |
| 22 .... | 322 .... | 47 .... | 647 .... | 76 .... | 776 .... |
| 23 .... | 223 .... | 49 .... | 449 .... | 77 .... | 777 .... |
| 24 .... | 324 .... | 50 .... | 650 .... | 79 .... | 779 .... |
| 25 .... | 325 .... | 51 .... | 651 .... | 80 .... | 480 .... |
| 27 .... | 827 .... | 52 .... | 252 .... | 81 .... | 481 .... |
| 28 .... | 828 .... | 53 .... | 353 .... | 82 .... | 482 .... |
| 29 .... | 829 .... | 55 .... | 455 .... | 83 .... | 383 .... |
| 30 .... | 230 .... | 57 .... | 457 .... | 84 .... | 484 .... |
| 31 .... | 231 .... | 58 .... | 658 .... | 85 .... | 485 .... |
| 32 .... | 232 .... | 62 .... | (x) .... | 86 .... | 886 .... |
| 33 .... | 233 .... | 63 .... | 663 .... | 87 .... | 887 .... |
| 34 .... | 234 .... | 64 .... | 664 .... | 88 .... | 888 .... |
| 35 .... | 235 .... | 65 .... | 665 .... | 89 .... | 889 .... |

atentu 62 ... iĝos 384



## K U L T U R A P A Ĝ O - Fernand ROOSE

Popoloj , interkonatiĝu per Esperanto (daŭrigo)

La supra alvoko estis unu el la programpunktoj de la antaŭmilita "Flandra Ligo Esperantista" kaj de ĝia revuo "Flandra Esperantisto".
Tial ili konatigis al aliaj nian kulturon kaj al ni aliajn kulturojn pere de publikigo de poemoj, artikoloj ktp.

En Nr. 3 de septembro 1930 aperis jena traduko de poemo de la Portugalo Balthasar Martinez-Duran :

### A M A K A N T O

Mi komparas viajn okulojn - kun tiuj matenaj steloj - kiuj lumigas la ĉielon - kaj kiuj tremetas, kiam vi rigardas ilin.
Mi komparas viajn lipojn - kun tiuj violoj - kiuj parfumas la teron - kaj kiuj ankaŭ tremetas ĉe viaj lipoj.
Mi komparas vian animon - kun la papilioj - kiuj mortas en la ombro - kaj kiuj mortas, kiam vi kaptas ilin.

Mi silente rigardas ŝin - ŝi, kun mieno distrita kaj malgaja - klinis ŝian frunton kaj duonfermis la okulojn - kvazaŭ ŝi ŝonĝis nedormante.
"Vi ne plu rigardas min", mi diris plendtone. - Kaj ŝi tiam respondis al mi, absorbe : - "Vi kredas ke mi ne rigardas vin ! Dum ĉi tiu momento - mi vidas la fundon de via animo".

Kiam mi mortinta estos - ne ligu miajn manojn - por ke mi povu eliri el mia ĉerko - por iri kaj preni vin.
Metu sur mia frunto - unufoje viajn lipojn - por ke mi povu senti vian spiron - kaj fine vekiĝi.
Metu en miajmanoj - malgrandan krucon - tiun kiun mi portas ĉirkaŭ mia kolo - kiam ni renkontos unu la alian.
Iru al via hejmo - de 'l mortintejo - kaj dumnokte - ne fermu la pordon - atendu min.
Kiam, post mia morto - mi revenos apud vi - ke mi trovu mian lokon malplena kaj viajn brakojn malfermitaj.

Mi senĉese rigardas tiujn du stelojn - kiuj en la malproksimo iras kune - ŝajnas al mi du animoj, kiuj iun nokton - interkonsentis rendevuon en la stelplena ĉielo.
Tremante ili iras, kunligitaj unu al la alia - en la senfina spaco; - neniu nubo sukcesas disigi ilin. - Tiaj estos niaj animoj !

tradukis Jan Van Schoor

# VLAAMSE ESPERANTOBOND
# FLANDRA ESPERANTO-LIGO

Zetel/Sidejo: Arsenaalstraat 5, 2000 Antwerpen.

---

## ĜENERALA JARKUNSIDO

sabaton 13-a de marto 1982

TAGORDO

1-a parto :

ADMINISTRANTARA KUNSIDO

1. Enkonduko
2. Raportado
3. Konkludo
4. -
5. Adiaŭo (eksigo) de la estraro

2-a parto

ĜENERALA JARKUNSIDO

1. Akcepto de la administrantaro
2. Elekto de nova prezidanto
   estraro
3. Instalado de la nova estraro
4. Ĝeneralaj decidoj :

4.1. INFORMILO : ĉu, pro financaj kialoj, redukti ĝin al KADRO-GAZETO ?
ĉu, malgraŭ la kostoj, tamen daŭrigi la estigon de vera flandra revuo ?

4.2. Ĝenerala jarraporto: S-ro Maertens proponis eldoni la jarraporton nederlandlingve kaj disvastigi ĝin kiel eble plej larĝskale inter la membraro, oficialaj instancoj ktp. Tamen, niaj financoj ne permesas al ni ion tian.

4.3. -

4.4. -

5. Laborplano - debato

-

# VLAAMSE ESPERANTOBOND

# FLANDRA ESPERANTO-LIGO

Zetel/Sidejo : Frankrijklei 140, B-2000 ANTWERPEN, Belgio

---

Jen, kiel aspektas la broŝuron kiun ni projektis por niaj grupestroj, kurs- kaj kunvengvidantoj, propagandistoj kaj aliaj interesitoj rilate al la eblecoj de Esperanto.

Ĝia prezo estos BF. 60,-

Tamen, por antaŭmendantoj kaj por pluraj ekzempleroj samtempe la prezo estos BF. 40,- plus sendokostoj.

Se vi aŭ via grupo/asocio interesiĝas pri la afero kaj se vi konsentas pri antaŭmendo, vi ĝojigus nin rehavigante al ni la ĉi suban slipon.

Dankon.

---

Nomo/Grupo/Asocio ____________________________

____________________________

____________________________

mendas ____ ekzemplerojn de "ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO"

Mi/Ni pagos : O kontante



O per ĝiro de BF. _____ en la konton 402-5510531-55 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen mencianta : "antaŭmendo ESPERANTO, KION MI POVAS ..."


# Esperanto

## kion mi povas fari per tio?

## REGLEMENT OVER DE TERMIJNBELEGGINGEN

1. **De Vlaamse Esperantobond aanvaardt van zijn leden beleggingen voor een vaste termijn van ten minste twee jaar. Stortingen, overschrijvingen en uitbetalingen worden genoteerd in persoonlijke rekeningen op de zetel van de Vlaamse Esperantobond. Enkel de kwitanties van die sommen en de rekeningen van de Bond gelden als bewijs van de beleggingen.**
2. **Het minimale bedrag van een belegging bedraagt 5000 Belgische frank. Stortingen kunnen gebeuren op de postrekening van de Vlaamse Esperantobond nr. 000-0265338-43, op zijn bankrekening nr. 402-5510531-55 of rechtstreeks in speciën op de zetel van de Bond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Indien de storting op een rekening van de Vlaamse Esperantobond gebeurde door bank- of postoverschrijving, dan geldt het stortingsbewijs als kwitantie; als de storting gebeurde op de zetel zelf, door een overschrijving of in speciën, dan is de kwitantie alleen geldig als zij werd ondertekend door de Directeur of door de Penningmeester van de Vlaamse Esperantobond.**
3. **De spaarperiode wordt slechts beëindigd indien de Vlaamse Esperantobond hiervan vóór het verlopen van de twee jaar schriftelijk bericht ontvangt. Bij stilzwijgen van de spaarder wordt de uitleenperiode automatisch voor de duur van twee jaar verlengd.**
4. **De uitbetaling na het verlopen van de spaartermijn gebeurt onmiddellijk voor een som van maximaal 20 000 fr. Indien de gevraagde som hoger ligt dan 20 000 fr., wordt het resterende deel uitbetaald in schijven van maximaal 20 000 fr. per maand. Deze regeling geldt niet voor overschrijvingen aan de Vlaamse Esperantobond zelf.**
5. **De rente is vastgesteld op 6 % en blijft ongewijzigd tot het publiek van een verandering wordt op de hoogte gebracht via het tijdschrift *Esperanto-Panorama*. De rente wordt steeds berekend per volledig jaar, te beginnen met de eerste dag van de maand die volgt op de stortingsdatum.**
6. **De rente wordt telkens uitbetaald na een periode van één jaar. Het volbrengen van een vraag tot voortijdige uitbetaling van de gestorte som of een deel ervan, heeft automatisch tot gevolg dat de rente van dat lopende jaar over de betreffende som vervalt. Indien paragraaf 4 van toepassing is, wordt bovendien rente berekend voor elke maand na het verstrijken van de minimale beleggingsperiode.**
7. **De berekende rente wordt aan de belegde som toegevoegd. De spaarder kan de jaarlijkse rente op eenvoudig verzoek ook ontvangen.**

*Bent u ook zo iemand die zijn*  *voor de dorst in een*  *thuis bewaart?*

Of brengt u uw  naar een gewone , waar u een kleine % krijgt?


**DAN HEBBEN WIJ IETS VOOR U**



*de Groene Rekening*



*6*  *rente, en bovendien wordt uw duurzaam spaar-* 

*gebruikt binnen de Esperanto beweging!* 

# *Bent ook U een Groene Spaarder?*

*Inderdaad, voortaan kunt U uw spaargeld ook beleggen bij de Vlaamse Esperantobond. Hoe gaat U te werk?*
*Zodra U een beetje spaargeld hebt (5000 fr. of meer) stort U die gewoon per post of bank op een van de rekeningen van de Vlaamse Esperantobond* met de vermelding „spaargeld". Verder hoeft U niets te doen. Niet om de haverklap naar uw bank of postkantoor, geen geknoei met coupons die moeten worden afgeknipt en ingeruild, geen spaarboekjes inleveren om de rente te laten berekenen. Al deze rompslomp volbrengt de Vlaamse Esperantobond voor U, volledig gratis. De rente van 6 % wordt automatisch bij uw belegging opgeteld zodat ook die rente op haar beurt rente gaat opbrengen!*
*Beslist interesseert U het ook te weten wat wij ondertussen met uw geld aanvangen. Dat is bij ons geen geheim. Uw geld wordt gebruikt voor projecten ter bevordering van het Esperanto in ons land. U ziet het, U krijgt een fikse rente, en bovendien steunt U de Esperantobeweging! Een mes dat voor U aan beide kanten snijdt!*
*Doe nu nog een overschrijving. Of loop even langs. Over een jaartje bent U al een heel stuk rijker!*

*Rekeningen van de Vlaamse Esperantobond: 000-0265338-43 en 402-5510531-55

La sama Jan Van Schoor, redaktoro de la revuo, verkis jenan poemon kiun vi ŝatos (?) pli malpli (?). Ja la gustoj ŝanĝiĝas en la paso de'l tempoj.

Ĉe 'l marbordo

Ĉe 'l horizont mortis la tag'.
Mi kuŝas sur la dun'.
Mil steloj brilas ĉe 'l ĉiel',
ĉirkaŭ la pala lun'.

Kviete kuŝas antaŭ mi
la mar' sen fin', sen lim'.
Beatan pacon ĉiuj nun
ni sentas en l' anim'.

Aŭdiĝas nun nenla bru'.
Silentas ĉiuj ni.
Ni sentas ke el la natur'
al ni parolas Di'.

---

La historia ŝerco.

La ĉi-sekvanta ŝerco estas iom "maldeca" aŭ "malpura", kiel vi mem juĝos. Sed ĝi farus plezuron al Louis Beaucaire, kiu konstatus, ke ĝi mankus en liaj libroj.

Kiel Edward de Vere, "Earl" de Oksfordo, iĝis admiralo.

---

Okazis dum la regado de Elizabeto I-a en Anglujo, dua dunono de 16-a jarcento. Okazis granda, solena, pompa kunveno de multaj nobeloj en la reĝina palaco. La reĝino mem estis en la mezo de la kompanio. Nu, ekzistas tiaj korpaj, subite leviĝantaj malfacilaĵoj kiuj povas trudi sin egale al plej altrang dignuloj kial al plej humilaj, "malaltaj" personetoj. Tio okazis ankaŭ al la nomita reĝino, subite, preskaŭ neeltenebIe, precize dum tiu kunveno. Kaj ... aŭdiĝis bruo, ne el la buŝo, sed el alia korpoparto. Ĝenego ! tion vi povas imagi ! Tamen, kelkfoje oni ne estas tute certa pri la persono kiu kaŭzas tian bruon. Tion rapide pripensis la en la titolo nomita nobelo. Pensante kiamaniere savi la reĝinon el la delikata situacio, li tuj ĵetis sin antaŭ ŝiaj piedoj kaj demandis pardonon, kvazaŭ estis li kiu kaŭzis la skandaleton. La iom ruĝiĝinta reĝino tuj rekompensis lin dirante : "Mi nomas vin admiralo. Vi ja estos sendube bonega maristo, vi, kiu kapablis tiel bone utiligi tiel malgrandan venteton".

---